Esperanto Kortrijk
LA KONKORDO

Novaĵletero

julio 2012

speciala eldono

p/a Tarwelaan 10 8500 Kortrijk tel. (0)56 / 20 07 96
retadreso : mailto:piet.glorieux@gmail.com
Retejo : http://sites.google.com/site/esperantokortrijk/

LA KONKORDO invitas:

BOAT-EKSKURSO sur la Bossuit-kanalo

dimanĉon, la 30 de septembro, je 14h en Bossuit (Avelgem)

La regiono sud-oriente de Kortrijk estas turisme ne tiel konata, tamen ĝi nepre malkovrindas. Estas kvieta regiono, iom dekliveca, kun belaj pejzaĝoj kaj pro tio ĝi tre taŭgas por promenado kaj biciklado. Ne senkiale ĝin kovras 'promen-retejo', het 'Land van Mortagne' [La Lando de Mortagne], nomata laŭ konata nobela familio en la regiono.

Ni invitas vin malkovri ĝin je originala maniero, t.e. per boato sur la kanalo de Bossuit, kanalo kiu ligas la riverojn Skaldo [l'Escaut] kaj Legio [la Lys]. La boato mem estas tn. barĝo de frisa deveno kaj havas lokon por (nur!) 12 personoj.

Ni rendevuos je 14h (akurate!) ĉe la 'Pompgebouw' [pumpstacia domo] en Bossuit, kie la kanalo renkontas la Skaldon. Poste ni ekveturos ĝis la kluzo de Moen, kie ni elboatiĝos kaj promenos (nur kelkcent metrojn) ĝis trinkejo Sint-Pietershof. Post trinkado ni reboatados al la 'Pompgebouw' kie ni kredas alveni je proks. 17h.

Por tiuj kiuj deziras, eblas manĝi poste ion en loka restoracio.

Praktike

Rendevuo je 14h (akurate) ĉe:
Pompgebouw
Doorniksesteenweg 402
8583 Avelgem-Bossuit

Aliĝkotizo: 5 Eŭroj. Trinkaĵoj kaj manĝaĵo ne inkludataj.

En via aliĝo menciu: nombro de personoj kaj ĉu vi deziras manĝi post la boatado

Bonvolu anonci vian venon plejeble rapide! La nombro de boatpasaĝeroj estas tre limigita.